

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando. Vi aŭdas la trian prelegon pri tiu temo.

Nun ekregas denove kvazaŭa publika ordo en Kongolando. La rezolucioj de Konsilio pri Sekureco, kiuj koncernis la unuecon kaj integrecon de Kongolando ŝajne realiĝis. Restas la problemo de la publika ordo, kiu grandparte dependas de rapida formado de kapabla intelekta elito. Du rezolucioj difinas tiun programon. Ni citu ilin:

*« Helpi la Registaron sekurigi kaj funkciigi la esencajn publikajn servojn, nome koncerne la sanon, instruadon, komunikadojn kaj bankojn. »*

*« Helpi la Registaron ekonomie kaj socie per entrepreno de vasta kaj longdaŭra programo por teknika formado kaj asistado. »*

Tiu lasta Rezolucio bone reliefigas la ĉefajn zorgojn de UN en Kongolando. La loĝantaro de tiu vastega lando estas teknike malsperta kaj eduke ne preparita por plenumi la respondecojn, kiuj rezultas de la sendependiĝo.

UN havas edukistan rolon. Ĝis hodiaŭ ĝi ludas ĝin kun granda saĝo. Prave ĝi decidis ne interveni en la politikajn internajn aferojn de la lando, ĉu naciskale, ĉu en la provinca vivo. UN provas neniam apogi aŭ kontraŭstari personecon aŭ partion. Kiel ni vidis pasintan semajnon la UN-Forto ricevis ordonon uzi plej malofte perforton, kaj tio nur por legitima defendo.

Tiun sintenon de UN ne ĉiam estas bone komprenata de la publiko, kiu ekzemple vidis en la reagoj de UN rilate la provokadojn de s-ro Tshombe simplan malforton. Valoras do provi kompreni la politikon de Unuiĝinta Naciara Forto en Kongolando koncerne la secesi-agadon de la katanga prezidanto.

Post sia sendependiĝo Kongolando estis akceptita en UN kiel unuigita lando enhavanta plurajn provincojn, inter ili tiun de Katango.

Tiu unueco de la lando estis akceptita de la tribestroj kaj prezidantoj de provincoj, inkluzive de s-ro Tshombe. Tio okazis dum la Konferenco de la Ronda Tablo en Bruxelles ĵus antaŭ la proklamo pri sendependiĝo.

Poste s-ro Tshombe profitis el la armea ribelo, se li ne instigis ĝin, por proklami la 11-an de julio 1960 la secesion de Katango.

Aliaj provoj secesii sin manifestis en diversaj provincoj. Ni citu tiun, kiun gvidis s-ro Alberto Kalonji en la sudo de la provinco Kasai.

UN estas en Kongolando pro alvoko de la Centra Registaro por asekuri la publikan ordon kaj la landan integrecon. En tiuj kondiĉoj UN povas nek sankcii, nek ignori la klopodojn instigi tribojn al civila milito aŭ eĉ secesio. UN kontraŭstaris ĉiun secesian movadon en Kongolando, sed ĝi respektas la personecon de iliaj instigantoj. Ilia juĝo far la UN-Forto estus interveno en la politikajn internajn aferojn de la lando.

Koncerne Katangon estas notinde, ke la katanga loĝantaro sin mem prononis en tiu demando pri secesio. En februaro 1960, ekzemple, la kongolandaj politikaj partioj, inkluzive la Conakat-partion, kiu estas tiu de s-ro Tshombe, interkonsentis, ke « *Kongolando konstituas en la kadro de siaj nunaj limoj sendependan Ŝtaton, kies loĝantoj posedas solan kaj saman naciecon* ». Ĉe la provincaj balotoj de 1960 en Katango la Conakat-partio de s-ro Tshombe atingis 25 el la 60 balotataj seĝoj. La Balubakat-kartelo, kiu estas la ĉefa kontraŭlo de s-ro Tshombe atingis 23 el tiuj seĝoj. Se ni rigardas la voĉojn, ni vidas, ke la Balubakat-kartelo kun la grupoj, kiuj kontraŭstaras la secesion, rikoltis 134'916 voĉojn kontraŭ 91'116 por la Conakat-partio kaj la grupoj, kiuj ĝin subtenas.

Alia fakto pripensinda pri la situacio en tiu regiono estas, ke la registaro de s-ro Tshombe neniam kapablis efektivan kontrolon en la norda duono de la provinco.

Oficiale s-ro Tshombe plurfoje sin mem prononis kontraŭ la secesio kaj sendependiĝo de Katango. Li faris tion en deklaro subskribita en Kitona la 21-an de decembro 1961 ; li refaris tion dum la oficialaj konversacioj, kiujn li havis kun s-ro Adula, la ĉefministro de Kongolando, en Léopoldville inter marto kaj junio 1962 ; li refaris tion ankoraŭfoje komence de septembro 1962, kiam li akceptis la U Thant-Planon por nacia reamikiĝo. Fine li refaris tion en la deklaro de Kolwezi, kies iniciaton li prenis la 14-an de januaro 1963.

UN ĉiam vidis kaj daŭre vidas en s-ro Tshombe la Prezidanton de la provinco Katango, sed ĝi ne rekonas al li aliajn rajtojn. Ĝi konsideras, ke geografie, historie, etne, kaj ekonomie Katango estas parto de Kongolando.

Tiun sintenon kaj paciencon de UN rilate al s-ro Tshombe ne ĉiam bone komprenis la vasta publiko. Tiu politiko tamen pruvis grandan pedagogian talenton flanke de la UN-Forto. Ĝi eble en la momento mem ne altigis la prestiĝon de UN, sed ĝi kun la tempo montriĝos prava metodo.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la laboro de Unuiĝinta Naciaro en Kongolando. Se vi deziras aŭdi la sekvontajn prelegojn pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-